Mimi

Ludocelo :

Sur bazo de vortlisto aŭ bildostako celas memori vortoserion por diri kaj mimi.

Por ludi :

La unua ludanto elektas vorton el la listo (aŭ el kartostako). Li mimas kaj diras ĉi tiun unuan vorton.

La dua ludanto elektas duan vorton. Li mimas kaj diras la unuan vorton kaj poste mimas kaj diras la duan vorton.

La ludantoj ludas laŭvice. La sekvanta ludanto refaras laŭ-orde la antaŭan serion kaj aldonas pluan vorton por mimi kaj diri.

Rimarko :

La vortserio grandiĝas, kiam forgeso, hezito aŭ eraro okazas, eblas mallaŭte subdiri aŭ gesti por helpi la embarasatan ludanton.

Post ridadoj, la ludo finiĝas en amika etoso sen venkinto nek perdinto, sed ĉiuj riĉigis sian vortprovizon.

Varianto :

Ludanto mimas vorton sed ne diras ĝin, la aliaj proponas vortojn. Tiu, kiu divenas la ĝustan vorton iĝas la mimulo.